# KUDRA kaj TRIKA TERMINARO

**M. kaj V. VERDA**

Dua eldono

Represo de la unua eldono kun permeso de
Universala Esperanto Asocio

1960

Eldonita de
ESPERANTO PRESS
Oakville, Ontario, Kanado

# KUDRA KAJ TRIKA TERMINARO

## Antaŭparolo

La diversajn terminarojn de la I.E.L.-aj jarlibroj ni ĉiam konsideras kiel provajn terminarojn, kaj ne kiel definitivajn, finitajn, por-ĉiam-servontajn kompilaĵojn. Kun tio en la pensoj ni entreprenis la jenan terminaron de kudrado kaj trikado.

La virinoj ofte renkontiĝas kaj volante paroli pri la diversaj okupoj de la virina mondo, ekparolas nacilingve—nur kaj sole pro manko de la necesaj terminoj. La kudrilo tiel intime apartenas al tiu virina mondo, ke Kudra kaj Trika Terminaro nepre estas urĝe bezonata. Ni proponas la jenan bazon por farota pli ampleksa terminaro. Ĝi estas normiga, ne instrua.

Ni prezentas diversajn novajn vortojn ; tiujn ni signas per steleto* († neologismo trovebla aliloke). Ni ne konas aliajn, jamajn aŭ pli taŭgajn, en Esperanto. Se vi konas tiajn, bonvole ignoru niajn, kaj nin informu pri viaj. Ni penis difini laŭ ilia enhavo la diversajn ŝtofojn ; tio ne estas tre kontentiga, sed alian rimedon ni ne havis, krom traduko de nomoj. Ĉu eble ? Ĉu necese ? Ĉi tiu malfacilo decidigis nin priskribi la aspekton aŭ la uzojn en nia lando por iuj ŝtofoj. Espereble tio helpos.

Komentojn, plibonigojn kaj kritikojn ni petas.

*Myrtle Verda.*
*Vilĉjo Verda.*

Leeds, 1947.

## LABORSPECOJ

**Alflikado** : la surkudrado de pecoj el unu ŝtofo sur fonon el alia ŝtofo, por formi desegnon.

**Brodi** : ornami teksaĵon per fadenoj, variigante **la** desegnon per diversaj kudreroj (vidu tiun **rubrikon**) **ekz**. ĉena, faska, fiŝosta, kuranta, k.s.

**Broki** : enteksi brodsimilan desegnon reliefan.

**Fadeneltirado** : ornami teksaĵon per la eltirado de apartaj aŭ opaj fadenoj de vefto aŭ/kaj varpo.

**Fliki** : surkudri aŭ subkudri al truo aŭ difektita parto de vesto aŭ tuko pecon da ŝtofo (kutime precize simila al la ŝtofo de la vesto aŭ tuko mem) por ĝin ripari.

**Kroĉeti** (**Kroĉi**) : la kroĉ(et)ado estas triksimila laboro por kiu oni uzas maldikan kroĉetilon ; la baza **kudrero** estas la ĉena.

**Kudri** : kunfiksi per fadeno du pecojn da ŝtofo aŭ du partojn de unu peco ; aŭ ornami per fadeno. Oni tratiras la fadenojn per maldika stangeto, la **kudrilo**. **Kudrero** : unu kompleta tratiro per kudrilo **kaj** fadeno.

**Stebi** : kudri per maŝino (stebilo, stebmaŝino). **Stebero** : unu kompleta trapiko kaj tratiro per stebpinto.

**Ŝtopi** : plenigi per fadeno truon en ŝtofo (precipe **trikoto**) farante teksajn movojn, aŭ farante densajn **rand**-kudrerojn ĉirkaŭ la truon ĝis pleniĝo.

**Tajli, Brodtajlado, Tajlbrodado** : ornami teksaĵojn, eltranĉante pecetojn, laŭ desegno jam indikita per randa kudrado (vd.) ; la randon de la truo tiel lasita fortikigas la randkudro (vd. ankaŭ sub PROCEDOJ).

**Tajlori** : fari vestojn laŭ la fasono kutima ĉe la viroj. Ĉi tiu vorto ampleksas ĉion rilatan al tiu metio : tajli, fasoni, kudri, gladi, k.c.

**Triki** : fabriki trikoton (vd.) farante seriojn da maŝoj per du aŭ kvar longaj maldikaj stangoj, la trikiloj. La **du** bazaj maŝoj estas *rekta* kaj *inversa*. Oni faras senfine diversajn desegnojn per alternado kaj diversaj kombinoj de tiuj du, ankaŭ per aliaj rimedoj ; ekz. kuntriko (kt.) de du (aŭ pli) maŝoj, aldoni maŝojn meze en linio, k.t.p. La dikon de la **trikiloj** oni mezuras per kalibrilo.



***Trikroĉi** : kiel la nomo indikas, la trikroĉado estas hibrido de la trikado kaj kroĉado. Oni kvazaŭ trikas, uzante kroĉilforman stangon, la trikroĉilon, sed uzas la ĉenon de la kroĉado aŭ la diversajn maŝojn, k.s. de la trikado, laŭbezone. (**Kroĉettriki**).

## SPECIMENA RECEPTO POR TRIKADO

**Vesto trikata** : Virina subvesto.

**Bezonaĵoj** : 3 uncoj (88 gramoj) da triobla lanfadeno,
2 trikiloj de grando (kalibro) 9,
$1\frac{1}{2}$ metroj da silka rubando.

**Mallongigoj** (por nomoj de trikeroj (maŝoj)) :
rek=rekta ; inv=inversa ; kt=kuntriku ;
ĉt=ĉirkaŭturnu (vd. procedoj).

Triku dorson kaj antaŭon precize simile.

Surmetu 84 maŝojn kaj triku 4 cm. da unumaŝaj kolonoj.

Poste komencu la desegnon jene :

1-*a linio* : inv 1, rek 2, inv 1, kt 2, ĉt, kt 2, ĉt (ripetu ĝisfine de linio).

2-*a linio* : rek 1, inv 2, rek 1, inv 4 (ripetu ĝisfine de linio).

**Ripetu** tiujn du liniojn ĝis la trikitaĵo havas longon de **20 cm.** entute.

Triku 4 cm. da **unumaŝaj** kolonoj.

Poste triku laŭ **la desegno** proksimume 12 pluajn cm. kaj finu per **3** cm. **da** kolonoj.

Detriku (forigu de la trikiloj).

**La Kunmeto** : Kunkudru la du flankojn kaj fiksu la rubandon en du partoj, kvazaŭ ŝelkon.

## PROCEDOJ

**Aldoni** (mallonge ald.) : ĉe la trikado : oni pligrandigas la nombron da maŝoj en linio, trikante du maŝojn en unu maŝo jam farita.

**Ĉirkaŭturni** (mallonge ĉt.) : ĉe la trikado : oni aldonas maŝon jene : volvu la lanfadenon unufojon ĉirkaŭ la trikilon, tirante ĝin sube unue kaj transmetante ĝin supere.

**Detriki :** forigi unuope la lastajn trikmaŝojn tiel, ke ili restos firme trikitaj.

**Drapiri :** orname kovri per gracie pendanta drapo, silko k.s. ; aranĝi belaj la faldojn de pendanta kurteno, k.s.

**Faltigi :** kuntiri mallarĝan faldeton en ŝtofo, kaj tion fiksi per kudro aŭ glade. **Faltarigi :** fari multajn tiajn faltojn, kiel ekz. ĉe kamparana kitelo en Anglujo ; kutime oni brodornamas tiujn faltarojn.

**Fasoni :** tiel tajli kaj kunkudri veston, ke ĝi havas belan formon kaj komforte, taŭge, sidas al la figuro de la portanto. **Fasonita** vesto kontrastas kun **Konfekcio** (vd. sub DIVERSAJ).

**Fintuŝi :** netigi la lastajn pecetojn de brodaĵo, de farata vesto, orlo, kunkudro, k.t.p. per delikataj kudreroj.

**Fliki :** (vd. sub LABORSPECOJ).

**Garni :** ornami ion per aldonado de garnituro, bantoj, ĉeniljo, kvastoj, k.s. akcesoraĵoj.

**Grefti :** A. (ĉe la trikado) : tiel kuntriki du eĝojn, ke la rezulta kuniĝo ne estas videbla.

B. (ĉe flikado kaj ŝtopado) : tiel enteksi la eĝojn de la fliko, ke la nova peco ne estas distingebla for de la originala ŝtofo.

**Kuntriki :** preni du maŝojn (aŭ pli) sur la trikilon kune por ke en postaj vicoj estu tiesloke nur unu maŝo (mallonge kt.)

**Orli :** fari falditan randon ; enfaldi kaj kunkudri la eĝojn de poŝtuko, jupo, aŭ de ĉia ajn ŝtofo.

**†Paŭsi :** trakopii desegnon ; la desegno troviĝas sur papero, sub kiu kuŝas la robo aŭ brodfono ; inter la desegno kaj la ŝtofo kuŝas paperfolio inke aŭ vakse kolorigita. Kiam oni krajonas laŭ la desegno la intera folio lasas la desegnon sur la ŝtofo. Oni brodas laŭ tiu paŭsita desegno.



**Remburi :** (simple) plenŝtopi sakon. (Praktike) plenigi poŝforman aŭ sakforman spacon per ia ajn ŝtofo, tiel, ke ĝi molsolidiĝas. Oni povas rembureti flikon dum alflikado (vd. sub LABORSPECOJ) por ilin elstarigi ; aŭ plenigi pupon per ĉifonaĵoj, haroj, k.s. ; aŭ kusenon, k.t.p.

**Ripari :** bonigi difekton, ŝiron, tranĉon, rompon, kaŭzitan al ia vesto, k.t.p. ; refortikigi eluzitan parton.

**Surprovi :** surmeti faratan veston sur la portonton por eltrovi ĉu modifoj necesas por perfekta fasono.

**Surtriki** (aŭ **surmeti**) **:** triki la unuan vicon da maŝoj.

**Ŝtopi :** plenigi truon, ekzemple en ŝtrumpo, per entekso de plua lano, aŭ per almeto de fliko.

**Tajli :** a. eltondi ŝtofon en la formoj necesaj por vesto. b. ĉe la brodado : ornami brodaĵon per la eltondo de diversformaj truoj, kies randojn oni fortikigas (vd. 1-an desegnon sur paĝo 63).

***Tredi :** enmeti fadenon, ŝnuron k.s. tra truo aŭ truoj, orlo, aŭ ringo k.t.p. Oni tredas fadenon en kudrilon ; oni tredas silkan rubandon tra truvico ĉirkaŭ bluzkolumo ; oni tredas stangon tra kurtenaj ringoj, laĉon tra truoj en la ŝuo, k.s.

**Triki rekte** (mallonge, rek aŭ rk) : Angla metodo : fari maŝon, komence enpuŝante trikilon tra jama maŝo en direkto sama kiel tiu de la trikilo sur kiu la jama maŝo troviĝas.

**Triki inverse** (mallonge, inv) : Angla metodo : fari maŝon, komence enpuŝante trikilon tra la maŝo en la direkto kontraŭ tiu de la trikilo tenanta la jaman maŝon.

## MATERIALOJ

**Alpako :** ŝtofo farita el la teksita lano de besto samnoma, sud-amerika speco de ŝafoj, similaj al la lamoj.

**Atlaso :** mola kaj glacea silkeca ŝtofo ; ĝenerale nur unu flanko estas glacea.

**†Bajeto :** maldelikata dika lanteksaĵo, ofte uzata por kovri i.a. tablojn k.s. Rafinitan specon oni uzas por kovri bilardan tablon.

**Batisto :** plej delikata lina tolo. **Batisteto :** tre maldika batisto, kia estas uzata por virinaj poŝtukoj k.s.

**Bombazeno :** kepreca ŝtofo el silko kaj lano.

**Ĉifono :** ĉifita peco da eluzita ŝtofo.

**Damasko :** speco de tolo kun enteksita samkolora silka desegno.

**Drapo :** lana ŝtofo, uzata por fari vestojn.

**Dreliko :** speco de fortika kaj nedelikata tolo uzata por sakoj, laborvestoj, tornistroj k.s.

**Felo :** la haŭto de besto, kun aŭ sen la haroj, tanota kaj uzota kiel materialo por vesto.

**Felpo :** ŝtofo simila al veluro, sed havanta harojn pli longajn, plate kuŝantajn.

**Felto :** ŝtofo farita el kungluitaj kaj forte kunpremitaj haroj, fadenoj, laneroj, k.s. Ofte uzata por sorbi skuvibrojn, dampi bruon (ĝi bone malhelpas ke bruo penetru).

**Flanelo :** mola teksaĵo el lano, varmiga, delikata kaj havanta sorbajn kvalitojn ; ofte uzata por subvestoj k.s. dum malvarma sezono. **Flaneleto :** simila ŝtofo pli maldika.

**Fusteno :** fortika ŝtofo, ofte kepra, farita el kotono kaj lino, kapabla elporti multan uzadon (similas al kotona veluro).

**Haroj :** ĉio fadensimila, ĉu animala aŭ ne, kiun oni povos uzi por la remburado k.s. ; ĉevalajn kaj aliajn longajn oni foje uzas tekse.

**Indieno :** maldika kotona kolordesegna teksaĵo kutime iom glacea.

**Kalikoto :** ŝtofo simila al tolo, iom dense teksita el kotono.

**Kalikoteto** (=perkalo) pli delikata kaj maldika ol kalikoto.

**Kamloto :** dika kaj maldelikata ŝtofo, kutime farita el la haroj de la Angora kapro, miksita kun silko, kotono aŭ lano.

**Kanvaso :** tolo el lino aŭ kanabo ; se el tre maldense teksitaj dikaj fadenoj oni faras sur ĝi brodadon ; dense teksitan oni uzas por veloj, tendoj, k.s.

**Kapoko :** kotono de aparta speco, havanta mallongajn harsimilajn fadenojn ; multe uzata anstataŭ haroj por remburi pli bonkvalitajn kusenojn kaj matracojn.



**Kaŝmira drapo** (Kaŝmiraĵo) : mola lanteksaĵo el la lano de la Kaŝmiraj kaproj.

**Katuno :** maldika, relative malaltekosta, teksaĵo el kotono ; ĝenerale la desegno sur ĝi estas surpresata unuflanke kaj ne enteksita.

**Kepro :** ĉia ŝtofo teksita tiel ke la vefto transiras unu varpan fadenon kaj subiras du aŭ pli, por fari oblikvajn striojn sur la surfaco de la ŝtofo. **Kepri, Kepra.** (**Kepro** estas vorto genra).

†**Korduro** (ankaŭ Kordurojo) : fortika maldelikata kotona teksaĵo, kies surfaco havas rektajn reliefajn striojn interproksimajn.

**Kotono :** la kruda lanugeca substanco el kiu oni teksas katunon kaj similajn ŝtofojn.

**Krepo :** krispa ŝtofo kutime gazeca, el silko aŭ lano. La vorto estas aplikebla ankaŭ al aliaj substancoj, ekz. kaŭĉuko, papero. (Komp. **Krispa**=havanta pli-malpli regulajn kaj ordajn ondojn ; **Krepa**=havanta multajn malpli grandajn faltojn kaj ondetojn senordajn).

**Kretono :** fortika senglazura ŝtofo (varpo el kanabo, vefto el lino) kiun oni ofte surpresas per desegno.

**Lano :** kreskaĵo harsimila sur la ŝafoj, sur iuj kunikloj, iuj kaproj, kaj la alpakoj.

**Ledo :** tanita besthaŭto senhara, preparita, por ŝuoj, rimenoj, kaj similaj uzoj.

†**Mohajro :** la tekseblaj haroj de la Angoraj kaproj.

**Muslino :** delikate malpeza katuno, uzata por inaj vestoj, kurtenoj, k.t.p.

**Nankeno :** ŝtofo el naturkolora kotono (laŭ nomo de urbo en Ĉinujo).

***Nilono :** plej moderna (1947) materialo modpopulara por virinaj ŝtrumpoj (ankaŭ aliaj objektoj, ekz. brosharoj k.s.)

**Pelto :** preparita felo, ĝenerale belhara, uzebla por fari aŭ ornami vestojn.

**Perkalo :** delikata sed dense teksita katuno, tia kian oni uzas por fari naztukojn.

***Plasto :** ĉiu el la multaj produktaĵoj faritaj el plastikaj substancoj, mulditaj ĉirkaŭ, sur, aŭ en modlilo aŭ muldilo ; ofte koloraj, klare travideblaj, pluvrezistaj, kaj fortikaj.

**Plumo(j) :** la birdaj kovraĵoj uzataj kiel garnituroj aŭ kiel remburaĵoj por kusenoj.

**Pluŝo :** ŝtofo simila al veluro, sed havanta pli longajn harojn.

**Punto :** delikata aĵureca retaĵo, kutime el silko aŭ maldika katuno, kun arte belaj desegnoj (ofte kroĉtrikita).

**Repso :** fortika ŝtofo el lano kaj kotono, iom simila al korduro (vd.)

**Reto :** maŝaro ; fadeno tiel teksita aŭ trikita, ke ĝi faras seriojn da ringoj aŭ kvadratoj k.s.

**†Sarsen(et)o :** dolĉe mola dika silko nun plej ofte uzata kiel subŝtofo.

**Serĝo :** speco de diketa fortika kepra ŝtofo, portata precipe por peza uzado.

**†Silesio :** ĉiu el la diversaj maldikaj ŝtofoj netravideblaj, uzataj por fenestro-kovraĵoj.

**Silko :** delikata ŝtofo farita el la fadeno brila produktata de iuj raŭpoj (kaj iuj araneoj).

**Stamino :** vualeca ŝtofo el kotono, nedense teksita, kun maŝoj iomete pli larĝaj ol tiuj de muslino.

**Ŝtofo :** ĉia substanco ĉu teksita, trikita aŭ alimaniere produktita, (ĉi tie uzata kun la senco) uzebla por vestoj.

**Tafto :** speco de maldika silka ŝtofo, teksita tre glacea.

**Teksaĵo :** ĉia produktaĵo de teksmaŝino.

**Tiko :** speco de fortika tolteksaĵo kun duopaj fadenoj. Ofte uzata por kovri matracon.

**Tolo :** teksita ŝtofo el kanabo aŭ lino, uzata por bonaj vestoj kaj litaj tukoj.

**Trikoto :** la rezultato de la trikado, precipe ĉe delikataj materialoj. Bedaŭrinda vorto ! Oni bezonas pli taŭgan, por eviti konfuzon inter vesto trikota (kiun oni trikos) kaj vesto trikota (el trikoto). Trikotaĵo estas ŝtofo jam trikita !

**Tulo :** delikata kaj travidebla retaĵo ofte uzata por vualoj.



**Veluro :** silka, kotona, aŭ lana ŝtofo, unuflanke densteksa, aliflanke havanta mallongajn haretojn. ***Teria veluro :** veluro, kies haretoj restas netranĉitaj kaj iom pli longaj.

**†Vincjo :** forta ŝtofo el lano kaj kotono, kun lanuga surfaco uzata por iuj eksteraj vestaĵoj. **Vincjeto :** simila ŝtofo pli maldika, uzata en Anglujo por dormvestoj, k.s.

## GALANTERIO

**Barto :** balena "dento" (osteca lameno) uzata por rigidigi vestojn k.s.

**Buko :** (vd. sub LIGILOJ).

**Butono :** (vd. sub LIGILOJ).

**†Ĉeniljo :** velureca ŝnuro uzata ĉe la garnado.

**Eĝrubando :** rubando pli aŭ malpli dika, larĝa, fortika, uzata plej ofte por fortikigi kaj protekti la eĝon de ŝtofo, de matetoj, de tapiŝoj.

**Eĝtubo :** tubforma rubando, enhavanta ŝnureton, iam uzata por ornami la eĝojn de koltruo, roba poŝo, k.s. (Ankaŭ **Tubrubando**).

**Elasta rubando, ŝnuro :** ĉio tia, kiu estas elasta, etendebla, streĉebla.

**Fadeno :** silka aŭ kotona ; longa maldika kuntordaĵo de multaj harecaj fibroj taŭgaj por la kudro, stebo, brodo, k.t.p.

**Falbalo :** krispa larĝa rubando alkudrebla sur jupon **k.s.** por ornamo.

**Fibulo :** (vd. sub LIGILOJ).

**Franĝo :** vico da proksime pendantaj kvastetoj, aŭ fadenoj, kutime el silko, per kiu oni borderas aŭ alie ornamas veston, kusenon, meblon.

**Galanterio :** ĉia akcesora ornamaĵo aŭ utilaĵo rilata al vestaĵoj aŭ tualeto.

**Galono :** ŝnuro aŭ rubando iom peza, ofte el oraj aŭ arĝentaj fadenoj, uzata por ornami vestojn kaj uniformojn ; ankaŭ por indiki rangon, oficon (pli peza ol ĉeniljo).

**Garnituro :** garnaĵo ; ĉia objekto ne nepre necesa, sed almetita por plibeligi.

**Ĵaboto :** punta aŭ alia ornamaĵo pleniganta dekolton aŭ brustan spacon ĉe bluzo aŭ robo.

**Krispo :** ondetara ŝtofo, iam uzata kiel kolumo.

**Kvasto :** fadenoj pendantaj faske aŭ kvazaŭ peniko, kutime silkaj, uzataj kiel dekoraciaĵo (ankaŭ **Kvato, Peniko**).

**Mercero :** la komercado per kaj pri galanterio kaj kudraj akcesoraĵoj.

**Pasamento :** ŝnuro aŭ rubando simila **al Galono** (supre) sed pli delikata, ofte el silko.

**Rimeno :** leda rubando, por ligi aŭ fiksi ion.

**Rubando :** strio el silko aŭ kotono, taŭge kolora, per kiu oni ligas, ornamas, bantas, k.t.p.

**Tuko :** peco da ŝtofo kun definitiva celo, uzo : tablotuko, naztuko, vindtuko, viŝtuko, k.c.

## ILOJ

**Bobeno :** cilindroforma objekto (kun du diskaj flanĝoj kutime) sur kiu oni volvas fadenon.

**Fibulo :** sendanĝera pinglo, sekurpinglo.

**Fingringo :** protekta kovraĵo por la fingropinto.

**Framo :** kadro sur kiu oni streĉas surbrodatan ŝtofon.

**Kalibrilo :** mezurilo por la diko de trikiloj k.t.p.

**Kroĉetilo :** maldika, malgranda stango kun hoketo, uzata ĉe la kroĉetado.

**Kudrilo :** malgranda stangeto havanta akran pinton kaj longan trueton, per kiu oni tiras fadenon tra drapo kaj ĉiaj ŝtofoj.

**Maŝtenilo :** ilo, ofte kun formo de longa fibulo, kiun oni tredas tra la maŝoj de trikado, por provizore teni ilin dum oni faras alian proceduon.

**Mezurrubando :** mezurilo kun formo de rubando, markita laŭ la uzataj (naciaj) mezurunuoj.

**Modelfolio :** papera folio kun la formo de la aparta vestoparto kiun oni tajlas. Oni kuŝigas ĝin sur la ŝtofo kaj aŭ tajlas ĉirkaŭe, aŭ markas ĉirkaŭe kaj tajlas laŭ la marko.



**Navedo :** bobenujo aŭ **-ingo, kiu en** stebilo aŭ teksmaŝino portas la fadenon tien-reen (ankaŭ **Naveto**).

**Numerilo :** ĉiu el la diversaj iletoj uzataj por registri aŭ "memori" la nombron da triklinioj aŭ trikeroj jam faritaj k.s.

**Pinglo :** stangeto, kutime metala, kun pinto ĉe unu ekstremaĵo kaj kapeto ĉe la alia ; uzata por provizora kunfikso de pluraj ŝtofpecoj.

**Stebmaŝino :** maŝino kiu kunfiksas pecojn da drapo, aŭ alia ŝtofo kvazaŭ kudrante. Plej ofte ĝi kunplektas du fadenojn, el kiuj unu estas sur bobeno en navedo, la **alia** tredita tra stebpinto (simila al kudrilo). Kutime oni funkciigas stebmaŝinon per pedalo, sed ekzistas ankaŭ multaj elektraj, kaj aliaj mane funkciigataj (ankaŭ **Stebilo**).

**Tondilo :** instrumento per kiu oni tajlas la ŝtofon, konsistanta el du kunpivotantaj klingoj.

**Transpresaĵo** (**-ilo**) **:** maldika paperfolio sur kiu desegnaĵo estas presita per vaksa inko. Oni almetas ĝin sur ornamotan veston k.s. kaj gladas la malantaŭon. Tio impresas la vaksan desegnon sur la veston, kaj laŭ tio oni brodas.

**Tredilo :** instrumento per kiu oni tiras fadenon tra truo (ekz. en kudrilo, aŭ en stebpinto) aŭ tra la tubo de orlo (ekz. ĉirkaŭ la zono de vira piĵama pantalono, aŭ de virina kalsono).

**Trikilo :** stango de difinita diko, kun pinto (kaj kutime ankaŭ kapeto), per kiu oni trikas.

**Trikroĉilo :** diketa trikilo, kun hoketo (kaj kutime ankaŭ kapeto) simila al tiu de kroĉilo sed kutime pli granda.

## LIGILOJ

**Agrafo :** hoketo kun ringetoj aŭ truoj, kiuj ebligas kudri ĝin al vestaĵo.

**Agrafingo :** stangeto (fadendika) kies ambaŭ ekstremoj estas ringoj por ebligi kudron sur veston. Agrafo troviĝas, ekz., sur unu basko kaj agrafingo sur la alia.

**Banto :** ligo per du ŝnuroj aŭ rubandoj, tiel farita, ke per tiro oni povas malligi ĝin. **Falsbanto :** tia ligo sed kudrita por ne malligiĝi, kaj uzata por kaŝi agrafon, k.s.

**Broĉo :** fibulo kun ornama disko aŭ juvelo sur unu stango.

**Buko :** ligilo kutima ĉe rimenoj kaj zonoj, precipe ledaj, konsistanta el metala ringo kun transversa stangeto, sur kiu troviĝas nefiksita "langeto" el metalo, kiu malhelpas elgliton de la rimeno.

**Butono :** tubero aŭ disko, kudrata sur vesto kaj puŝata tra truo por kunteni ekz. la jakan fronton.

**Fibulo :** sendanĝera pinglo ; ĝi konsistas el longa pinglo, kies pinto estas turnita al la kapo kaj kovrata per ŝirmilo tie fiksita.

**Laĉo :** beleta ŝnuro uzata por ligfiksi ŝuon, korsaĵon k.s.
**Laĉmetalo :** unu el la metalaj pecetoj, fiksitaj al ĉiu ekstremo de laĉo por faciligi tredadon.

**Pinglo :** stangeto kun kapeto kaj pinto.

**Prembutono :** metala butoneto en du partoj ; unu parto (prembutoningo) povas fiksi sin sur la alian per iom forta premo ; oni apartigas per pli forta tiro ; ofte uzata ĉe jupligejo sub agrafoj, kiuj estas pli firmligaj.

**Ŝnuro :** orde kuntorditaj fadenoj aŭ haroj.

***Zipligilo :** rapide fermebla ligilo por longaj aperturoj. Ĝi konsistas el vico da hoketoj sur ambaŭ flankoj de la aperturo, kiujn oni povas tuj interkroĉigi per (zip-) fermilo. (Oni aŭdas sonon similan al *zip* ĉe la uzado). **Tirligilo.**

**Zono :** rimeno aŭ rubando ĉirkaŭ la talio (kaj ofte ĉirkaŭ alia korpoparto).

## DIVERSAJ VORTOJ

**Apreturo :** kemia glazuro ofte uzata por finpretigi ŝtofojn, precipe malaltekostajn tolojn.

**Bulo (Lanbulo) :** globforma stato de lanfadeno preta por trikado.

**Bordero :** ia ajn ornama aranĝo de ŝtofrando.

**Ĉirkaŭturni :** aldoni maŝon jene : metu la lanfadenon sub kaj super la stangon tiel, ke la fadeno ĉirkaŭiras la stangon.

**Dufaldo (Interna, Ekstera) :** duobla platfaldo, aranĝita pare (vd. desegnon sur paĝo 63).



***Eskalopoj :** serio da duonrondoj, kiuj ofte anstataŭas orlon aŭ alian randan ornamon.

**Faldo :** ĝenerala vorto por ĉiuj procedoj aŭ drapiroj, kiuj necesigas duobligon de la ŝtofo. Vidu : **Platfaldo, Dufaldo, Pintfaldo, Refaldo, Fiksfaldo.**

**Falto :** tre malgranda faldo kudrita aŭ premita tiel ke ĝi restos videbla ; neregula faldeto lasita de malbona glado. (Pintfaltoj = plej malgrandaj faltetoj ornamaj).

**Fasko (Lanfasko) :** ringforma stato de lanfadeno, antaŭ ol buligo por trikado (ankaŭ **Lanringo**).

**Fiksfaldo (Fiksita Faldo) :** faldo uzata por mallongigi veston k.c. kudrita aŭ alie firmigita.

**Inversigi :** turni la internon de ŝtofo eksteren pro pli bona aspekto.

**Junto :** vorto uzebla anstataŭ Kunkudro (vd.)

**Kolonoj :** strioj faritaj per maŝoj en la sama loko en ĉiu linio.

**Konfekcio :** vestoj jam faritaj, kaj aĉetataj rekte el la vendejo senmezure ; vestoj ne faritaj laŭ speciala mezuro de portonto. Kontrastas kun **Fasonitaj Vestoj.**

**Kruckolora :** silkaĵo teksita el malsamkoloraj vefto kaj varpo ; laŭ vidpunkto kaj lumo unu koloro aŭ la alia, aŭ ambaŭ, vidiĝis.

**Kunkudro :** kutima vorto por ĉia kunfiksejo de ŝtofoj ; flanke laŭ pantalono, sube laŭ maniko.

**Ligo :** kunvolvo de ŝnuro, rubando, k.s. por kunteni du pecojn ; nodo, banto.

**Modo :** vestmaniero, stilo, siatempe populara.

**Modellibro :** ĉia eldonaĵo por prezento de novaj (freŝaj) modoj, stiloj, k.t.p. (ankaŭ **Modgazeto**).

**Nodo :** tubera ligaĵo de ŝnuro k.s. (vd. **Ligo**).

**Orlo :** rando de ŝtofo refaldita kaj kudrita tiel, ke kruda eĝo estas protektata kaj nevidebla.

**Pintfalto :** (vd. supre **Falto**).

**Platfaldo :** faldo glade firm-markita por ornami aŭ doni formon al vesto.

**Provpupo :** torso de pupo homgranda, kun pli-malpli natura formo, kiu portas veston faratan.

**Refaldo :** faldo ĉe vestrando, kolumo, por montri la flankon internan.

**Subŝtofo :** ĉia ŝtofo uzata interne de vesto aŭ por plia diko, aŭ por plia komforto ; kutime malpli dika, ofte silka.

†**Ŝika** (pli prefere ***Ĉika**) **:** elstare laŭmoda, beleta, moderne eleganta.

**Tekseĝo :** la natura sentranĉa longa eĝo de la teksita ŝtofo, kun ĉiuj returnoj de la vefto. Ofte kun pluraj varperoj.

**Varpo :** la fadenaro kuŝanta laŭlonge en la teksaĵo. **Varpero :** unu tia fadeno.

**Vefto :** la fadenaro kuŝanta transverse en teksaĵo. **Veftero :** unu transversiro de vefto.

## ORNAMAĴOJ

Vidu sub rubriko GALANTERIO :
buko, butono, ĉeniljo, eĝrubando, brodaĵo, falbalo, franĝo, galono, krispo, kvasto, pasamento, rubando.

Vidu sub rubriko LIGILOJ :
barto, broĉo, laĉo.


Vidu sub rubriko PROCEDOJ :
falto, faltarigo, faldo, dufaldo, kolonoj, orlo.

Vidu sub rubriko LABORSPECOJ :
Fadeneltirado, tajlado.




## DIVERSAJ KUDREROJ


La ilustraĵoj estas el la libreto *Stitches by Penelope* (**Kudreroj** de Penelope), kaj estas presitaj laŭ la afabla **permeso** de la eldonistoj, Wm. Briggs & Co., Ltd.




RETROIRA



PLENIGA




GALOPA **aŭ** KURANTA



Petala




Ĉena





Kontura







Fiŝosta (ank. pleniga)




Rand(Bind)a
pli densa, meze sur ŝtofo



Rand(Bind)a





Muŝpaŝoj aŭ Koksfuro




Kruca







Tajlita Tablotuko



Orlo de jupo
montranta dufaldon
(eksteran)



Juporlo
montranta dufaldon
(internan)



Faskoj

**'PULĈINELO'** - Konstrua vortludo por 2-6 personoj.

La ludilo konsistas el 6 'konstruejoj' (kartonoj sur kiuj oni interkruce konstruas vortojn kaj frazojn), 220 grandaj literoj esperantaj, 239 vortradikoj, 82 prefiksoj kaj sufiksoj, 164 gramatikaj finaĵoj kaj 15 'pulĉineloj'.

Prezo: 7 steloj

## 'ĈIUJARA MURKALENDARO'

Grandformata (29 x 21 cm) monata kalendaro el helflava kartono kun plastaj bindiloj. Per sistemo de slipoj oni indikas la semajntagojn, tiel ke la kalendaro estas ĉiun jaron uzebla. Libera spaco sur la monataj folioj ebligas ŝanĝon de la ornamo per bildkartoj, eltranĉaĵoj el gazetoj ktp.

Prezo: 11 steloj

## 'THE LIFE OF ZAMENHOF' (EDMOND PRIVAT)

Reeldono de la angla traduko de la konata libro.

Prezo: 14 steloj

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe la eldoninto:
ESPERANTO PRESS, Oakville, Ontario, Kanado

## RECENZO EL 'Franca Esperantisto':

### VERNA HILLS:
### 'ALKO KAJ SUNA EN SIAJ DU DOMETOJ'

'Alko kaj Suna', tradukita de Rüdiger Eichholz el la angla lingvo kaj adaptita por internacia publiko, taŭgas por 3-6 jaraj infanoj. Do, la infano mem ne legas, sed la libro estu uzata de plenkreskuloj por rakonti al la infanoj. Tiu ĉi libreto havas la celon "kulturi la povon vidi ordinarajn aferojn en speco de sunlumo de surprizo" kaj "kuraĝigi ĉe infanetoj senton pri netuŝeblaj spiritaj valoroj." En Antaŭparolo, Sophia L. Fahs klarigas al la gepatroj la bazon de tiu pedagogio. Edukistoj zorge ellegu tiun antaŭparolon.

La enhavo de la mallongaj rakontoj konsistas el priskribo de la ĉiutaga vivo de knabo kaj knabino, kaj respondas al la anoncita celo. La aŭtorino intence forlasis ĉian fabelan elementon. La infanoj estas kondukataj al malkovro de la naturleĝoj (klarigo pri la pluvo, la ombroj ..), al la kompreno de la nocio de vivo (la fratineto de Suna vivas, ankaŭ la kato, sed ne la pupo), al distingo inter realo kaj ludo, kaj eĉ al kompreno de sociaj devigoj (ankaŭ plenkreskuloj ne rajtas fari ĉion ajn). Ĉiu rakonteto estas do agrabla leciono kaj utila gvidilo por gepatroj, ĉar la rakontoj estas ĉefe bazitaj sur la demandoj, kiujn faras la infanoj al la gepatroj aŭ plenkreskuloj.

Gratulon al Esperanto Press.

Michel Duc Goninaz

Prezo: 14 steloj

# Bulteno Gepatra

sendependa revuo por dulingva edukado

enhavas artikolojn kaj konsilojn pri ankaŭ esperantlingva edukado de infanoj kune kun materialo taŭga por la distro kaj interesigo de infanoj. Subtenu ĝin. Ĝi aperas laŭeble kvarfoje dum jaro.

Abonprezo por 4 numeroj: 14 steloj

Malnovaj numeroj binditaj:

N-roj 59-62 (1958): 10 steloj

N-roj 63-69 (1959/60): 14 steloj

Mendu ĉe

ESPERANTO PRESS, Oakville, Ontario, Kanado

# TERMINAROJ

reeldonitaj de ESPERANTO PRESS

1. Terminaro por Infanludoj .......... S.B.E.T.
2. Radio-Terminaro ............... A. Venture
3. Muzika Terminaro ..... M.C.Butler kaj F.Merrick
4. Kudra kaj Trika Terminaro ..... M. kaj V. Verda

Prezo de ĉiu vortareto: po 4 steloj

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe la eldoninto

ESPERANTO PRESS, Oakville, Ontario, Kanado